## Partatempa partopreno

La kotizo estas por la unua tago 22 % de la kompleta kotizo; la postaj tagoj kostas po 13 % de tiu sumo.

## Ĝeneralaj informoj

**Antaŭpago:** Por ĉiu persono 50 eŭroj.
**Aliĝdato:** Ni kalkulos laŭ la alvendato de la aliĝo papera aŭ retpoŝta, se la aliĝanto ĝis la limdato forsendas la antaŭpagon. La aliĝo validas nur post alveno de la antaŭpago kaj post nia konfirmo.
**Malaliĝo** ĝis la 30-a de oktobro: Repago de via kompleta aliĝkotizo sen subtraho. Malaliĝo ĝis la 2-a de decembro: Subtraho de 30 eŭroj.
Poste/neanoncita nealveno: Neniu repago de la aliĝkotizo; eventuale necesos pagi la kostojn de la domo. Kaze de malsano ks. ni kutime repagas la aliĝkotizon. Ni vin tre petas informi pri eventuala neveno por eviti senutilajn elspezojn. Transdono al alia persono: Neniu subtraho; pagendas laŭ la nova aĝokategorio, sed minimume la sama sumo kiel la unua aliĝinto.
**Kontoj:** N-ro 2596 58-301, EsperantoLand e. V., ĉe "Postbank Hannover" (germana banka kodo 250 100 30; internacia kontonumero - IBAN: DE07 2501 0030 0259 6583 01, internacia banka kodo - BIC: PBNK DE FF), indiku "NR". Konto eold-g, EsperantoLand, ĉe Flandra Esperanto-Ligo kaj same ĉe Universala Esperanto-Asocio. Eblas antaŭpagi per sendado de ĉeko aŭ eŭro-monbiletoj (je risko de la sendanto) al nia suba adreso.
La **ekskursoj** estos aparte pagendaj.
**Rabato** por programkontribuantoj kaj helpantoj laŭ interkonsento.
**EsperantoLand e. V.**, Lu Wunsch-Rolshoven, Wiclefstr. 9, 2. Gartenhaus, 10551 Berlin, Germanio, lu.esperanto@gmx.de, tel. +49-30-685 58 31, telekopiilo +49-30-68 05 70 11, http://www.esperantoland.org/nr

---

Eble vi interesiĝas ankaŭ pri niaj aliaj renkontiĝoj
**PRINTEMPE kaj SOMERE**.
esperantoland.org/printempe esperantoland.org/somere

Kaj eble vi havas inter 14 kaj 35 jarojn kaj deziras partopreni en la programo de la **4-a Novjara Internacia Semajno (NIS)**, ankaŭ dum novjaro en Xanten.

esperantoland.org/nr

**Komune festi la Novan Jaron**

# 11-a Novjara Renkontiĝo

**2012-12-27 ĝis 2013-01-03**
**(ĵaŭdo ĝis ĵaŭdo)**



**Xanten, inter Nijmegen kaj Essen/Ruhr**
**Germanio**

**Por la kreskigo de Esperantujo**
**www.EsperantoLand.org**

# Komune festi la Novan Jaron

En la pasintaj "Novjaraj Renkontiĝoj" (NR) ĉeestis inter 120 kaj 195 partoprenantoj; ili aĝis inter du monatoj kaj okdeko da jaroj. Estis familioj kun entute ĉ. sesdek infanoj; krome ĉeestis kvindeko da unuopuloj kaj paroj sen infanoj. Por la duono de la infanoj Esperanto estas denaska lingvo.

## Internacia partoprenantaro

Feliĉe la plimulto venas el eksterlando, el pli ol dek landoj, kaj tio kreas bele internacian etoson. Ni invitas vin partopreni en la dekunua NR, ĉi-foje en Xanten, meze inter Nijmegen kaj Essen/Ruhr, apud Nederlando. Refoje ni ŝatos ĝui agrablan etoson kun amikoj, konatoj kaj novuloj. Multaj denove estos el la meza generacio, kun aŭ sen kunuloj kaj infanoj; ankaŭ ĉi-foje ni bonvenigos homojn pli aĝajn kaj pli junajn.

## Libertempo kaj iom da kleriĝo

Ni volas pasigi kelkajn agrablajn tagojn kaj havi multan lokon por neformalaj interparoloj. Ni ĝuos promenojn kaj vesperan programon kaj havos plurajn koncertojn de Esperanto-muzikistoj (JoMo, Tone kaj Patrick de Dolĉamar) kaj (pup-)teatra prezenton de Christoph Frank. Okazos prelegoj, diskutrondoj kaj kursoj. Ni antaŭĝojas pri via programkontribuo - ne hezitu anonci vin ĉe ni. Estos denove multfaceta aparta programo por etaj kaj grandaj infanoj.

## Renkontiĝejo proksime al Rejno

La urbo Xanten troviĝas okcidente de la Ruhr-regiono kaj estas proksima al Nederlando kaj Belgio. La renkontiĝejo troviĝas iom sude de la urbo, bone atingebla per buso. Xanten estas malnova, ĝi jam ekzistis en la tempo de la romianoj; estas kelkaj restaĵoj el tiu tempo.

## Tranoktado

La ĉambroj disponas pri duŝo kaj necesejo. Estas 1-/2- kaj 4-personaj ĉambroj.
Certe ankaŭ ĉi-foje ni trapasos belajn feriajn kaj amuzajn tagojn dum Novjara Renkontiĝo.

## Lerni aŭ plulerni Esperanton kaj tuj apliki ĝin

La renkontiĝo ĉefe direktiĝas al Esperanto-parolantoj. Krome ni ofertos kurson por kelkaj komencantoj en la unuaj du tagoj de la aranĝo (28-a kaj 29-a de dec.); estos daŭriga kurso kaj konversacio por progresantoj. Tiel eblos en unu sama renkontiĝo eklerni la lingvon kaj tuj apliki ĝin en internacia rondo.

## Ĉu vi interesiĝas?

Tiam bonvolu plenigi la paperan aliĝilon aŭ la retan ĉe www.esperantoland.org/nr

## Plena kotizo (7 tagoj; en eŭroj)

| Aliĝo ĝis | 30-a de apr. | 1-a de julio | 30-a de sept. | 2-a de dec. | poste |
|---|---|---|---|---|---|
| 0 ĝis 4 | 0 | | | | |
| 5 ĝis 17 | 185 | | | | |
| 18 ĝis 27 | 190 | 200 | 210 | 225 | 235 |
| ekde 28 | 300 | 315 | 325 | 340 | 350 |

(Aĝo je la komenco de la renkontiĝo)

La kotizo inkluzivas la manĝojn kaj la tranoktadon, la programon (sen la ekskursoj) kaj la silvestran feston kun bufedo. La baza kotizo validas por dupersona ĉambro (ekde 28 jaroj) aŭ familia/junula ĉambro, kun duŝo kaj necesejo.

**Aldono por dupersona ĉambro** (ĝis 27 jaroj): 70 eŭroj por 7 tagoj
**Aldono por unupersona ĉambro:** 70 eŭroj por 7 tagoj (10 eŭroj tage), kompare kun la prezo por dupersona ĉambro.

**Rabato por tri-/kvarpersona ĉambro** (ekde 28 jaroj; ne por familiaj/junulaj ĉambroj): 70 eŭroj por 7 tagoj (10 eŭroj tage).

**Rabato por eksterlande loĝantaj plenkreskuloj:** 14 eŭroj (2 eŭroj tage). Rabato por ekstereŭrope loĝantaj partoprenantoj: 42 eŭroj (6 eŭroj tage).

Aliĝilo por la

**11-a Novjara Renkontiĝo (NR) aŭ**

**4-a Novjara Internacia Semajno (NIS)**

2012-12-27 ĝis 2013-01-03

en Xanten

Mi/ni aliĝas kiel plenpaganto(j).

Partopreno: 2012-12-27 ĝis 2013-01-03 aŭ aliaj datoj*:

| Persona nomo, familia nomo | viro/virino | naskiĝdato |
|---|---|---|
| | | |
| | | |
| | | |
| | | |
| | | |

Adreso, lando:

Telefono: _________________ Telekopiilo: ______________

Retpoŝta adreso (tre legeble!): __________________________

Kiom da personoj manĝos vegetare__/ne gravas__/nevegetare__?

O Mi ŝatus loĝi en unupersona ĉambro.

O Mi/ni ŝatus loĝi en dupersona ĉambro.

O Mi/ni ŝatus loĝi en tri-/kvarpersona ĉambro.

(* Bv. indiki.)

Via ebla kontribuo al la programo (eble notu dorsflanke):

Rimarkoj:

Mi/ni venos per O trajno O aŭto O aviadilo.

O Vi rajtas mencii mian nomon sur la NR-retpaĝoj.

Mi antaŭpagos 50 eŭrojn por ĉiu aliĝinto.

Dato Subskribo

(sendu al: EsperantoLand e. V., Lu Wunsch-Rolshoven, Wiclefstr. 9, 10551 Berlin, Telekopiilo +49-30-68 05 70 11, esperantoland.org/nr)

Aliĝilo por la

**11-a Novjara Renkontiĝo (NR) aŭ**

**4-a Novjara Internacia Semajno (NIS)**

2012-12-27 ĝis 2013-01-03

en Xanten

Mi/ni aliĝas kiel plenpaganto(j).

Partopreno: 2012-12-27 ĝis 2013-01-03 aŭ aliaj datoj*:

| Persona nomo, familia nomo | viro/virino | naskiĝdato |
|---|---|---|
| | | |
| | | |
| | | |
| | | |
| | | |

Adreso, lando:

Telefono: _________________ Telekopiilo: ______________

Retpoŝta adreso (tre legeble!): __________________________

Kiom da personoj manĝos vegetare__/ne gravas__/nevegetare__?

O Mi ŝatus loĝi en unupersona ĉambro.

O Mi/ni ŝatus loĝi en dupersona ĉambro.

O Mi/ni ŝatus loĝi en tri-/kvarpersona ĉambro.

(* Bv. indiki.)

Via ebla kontribuo al la programo (eble notu dorsflanke):

Rimarkoj:

Mi/ni venos per O trajno O aŭto O aviadilo.

O Vi rajtas mencii mian nomon sur la NR-retpaĝoj.

Mi antaŭpagos 50 eŭrojn por ĉiu aliĝinto.

Dato Subskribo

(sendu al: EsperantoLand e. V., Lu Wunsch-Rolshoven, Wiclefstr. 9, 10551 Berlin, Telekopiilo +49-30-68 05 70 11, esperantoland.org/nr)